

Brazila Esperantisto


649-651

Apr. / Jun.
1968

62-a jaro

Nia sidejo — En tiu ĉi konstruaĵo sur Placo República lokiĝas Brazila Esperanto-Ligo. Tie ĝi estas ekde 1937 kaj komence okupis la unuan etaĝon, kun Brazila Societo de Geografio kaj Brazila Societo de Filozofio. Poste ĝi transiris al la dua etaĝo, kie ĝi restas ĝis nun.

Antaŭe en tiu konstruaĵo funkciis Libera Fakultato de Juro. (p. 2).



Balancete referente a 1967

Receita

	NCr\$
Saldo de 1966	0,13
Assinaturas	556,29
Comissões	543,21
Contribuições	7.651,60
Cursos	1.253,50
Despesas de sede (B.K.E.)	200,00
Diversas receitas	1.461,94
Donativos	126,00
Revista (B.K.E.)	50,00
Serviços de livros	4.900,89
	16.743,56

Despesa

	NCr\$
Assinaturas	193,26
Biblioteca	246,00
Comissões	460,00
Cursos	111,73
Despesas de sede	2.538,59
Diversas despesas	495,61
Franquia	401,29
Informação	376,00
Material de expediente	205,01
Quotas U.E.A.	5.587,85
Revista	524,10
Serviço de livros	4.209,88
Serviço de secretaria	1.393,00
Saldo para 1968	1,24
	16.743,56

Rio de Janeiro, 2 de janeiro de 1968

(a) Irani Baggi de Araújo
Tesoureira

Nia kovrilo: La lokigo de la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo estas privilegia. Antaŭ ĝi vidiĝas la Parko Júlio Furtado, kies arboj tenas agrabla la temperaturon eĉ en la plej vermaj tagoj de la jaro. Sur Placo República troviĝas gravaj kaj historiaj institucioj, kiaj Nacia Arĥivo, Federacia Fakultato de Juro, Instituto de Peso kaj Mezuroj, k.t.p.

62-a Jaro

N.º 649-651

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara

dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefona: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande: 18 steloj aŭ 15
respondkuponojQUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO
1968

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazilia Esperanto"	10,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	30,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	40,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	65,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE
ESPERANTOPRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

De como Hodler fundou a U. E. A.

Edmond Privat

Um cartão-postal de 1908, amarelecido por meio século, mostra a caricatura do jovem Hector Hodler, com vinte anos, barbicha negra, manobrando, para todo o mundo, um feixe de fios telegráficos. Um retrato justo e acertado, porque, com efeito, devemos à clarividência e perseverança desse moço generoso a base vital do nosso movimento, com seus delegados e seus serviços especializados.

Foi ele não só o organizador, mas também o filósofo do nosso movimento e a U.E.A. floresceu com este seu pensamento básico: nossa língua não é uma proposta mas um instrumento que é e deve ser imediatamente utilizado. Quanto maior sua utilização, tanto mais longa sua existência.

Conhecia Hodler desde a meninice, e embora fôsse ele dois anos mais velho, fizemos juntos o curso ginásial. Aquêlê rapaz alto e magro, ativo e calado, que sempre admirei, parecia tudo ler, tudo saber, tudo compreender. Sem que soubéssemos, aprendemos Esperanto na mesma época, com uma brochura achada ao acaso, e quando, surpresos, descobrimos isso tornamo-nos amigo inseparáveis, e sempre juntos, trocávamos diariamente livros e idéias. Em 1903 fundamos a revista *Juna Esperantisto* e correspondemo-nos com o Dr. Zamenhof, Reitor Boirac, Prof. Cart, e por divertimento, aprendemos, a título de comparação, línguas artificiais como Bolak, Idiom Neutral, etc. Já sentíamos que a superioridade principal residia na força vital do Esperanto e na sua inspiração ideal, que nêlê soprava o gênio criador, ou mais justamente o "iniciador" como Zamenhof se denominava, numa justa percepção científica e numa modéstia que lhe era típica.

Em 1905 fui ao I Congresso em Bolonha-do-Mar (não a pé, como se disse) e organizei com Hodler o II Congresso Universal em Genebra, em 1906. Zombeteiro, com uma ironia crítica, êle se divertia muito com a ingenuidade das solenes autoridades municipais que por necessidade tínhamos de visitar e também com a surpresa dos professores de ginásio quando pedíamos dispensas das aulas, apresentando ofício de convocação.

Naquele tempo, o pai de Hodler, pintor genial, mas pobre, era ainda muito criticado. De repente, vieram fama e sucesso financeiro. Quando terminamos o ginásio em 1907, o filho se dedicou inteiramente à nossa causa, e tomou de Paul Berthelot a revista *Esperanto*. Despedimo-nos com pesar, pois eu viajava para a Inglaterra e os Estados Unidos para fazer cursos e preleções, antes de começar a faculdade, em Paris.

Não só da ingenuidade dos políticos caçoava Hector Hodler, mas também das ilusões de muitos esperantistas que confiavam nas aprovações públicas e nas promessas de gente de nomeada para o sucesso do Esperanto. Dava-lhe engulhos a pretensão do Sr. Couturat e de sua "Delegação para escolha da língua auxiliar", o qual imaginava que uma comissão de nomes ilustres seria suficiente para tornar oficial uma língua mundial e fazê-la ensinada nas escolas. Ria-se também dos membros dos nossos grupos, que não sabiam mesmo a língua e, muitas vezes, ficava impaciente com o lado teórico do nosso movimento, que só sabia propor e ansiava por uma organização que utilizasse a língua movendo-se para provar o movimento, no dizer do filósofo grego.

Embora eu tivesse visitado, em Washington, o presidente Theodore Roosevelt, em 1908, para divulgar nossa causa na imprensa americana, concordei com Hodler que o uso é muito mais importante do que a propaganda e, de volta à Europa, alegrei-me com a primeira reunião da U.E.A. no IV Congresso Universal, em Dresda, quando o Dr. Zamenhof felicitou Hodler e declarou que "a U.E.A. é indubitavelmente a mais importante instituição do nosso movimento". Homens talentosos como os franceses Rousseau e Carles, colaboraram para estabelecer o sistema dos nossos *consules* locais, mais tarde delegados, e em breve, Eduardo Steller e Hans Jakob auxiliaram Hodler na escrita contábil e na publicação de anuários cada vez mais ricos. Estas foram as obras-primas de Hans Jakob.

Na primeira guerra mundial o escritório central pôde dar ajuda e informações a milhares de famílias infelizes, sem notícias de parentes desaparecidos na guerra ou prisioneiros. Como a sede era,

naquele tempo, em Berna, e novamente em Genebra, sempre num país neutro, esta atividade filantrópica mostrava a bondade de Hector Hodler e de seu dedicado seguidor Hans Jakob. Sob o aspecto irônico e aparentemente pessimista, escondia-se em Hodler um espírito profundamente humano. Durante a primeira guerra mundial escreveu um memorando sobre as diversas causas dos conflitos entre as nações. Os meios que propunha visavam a uma organização mundial sobre os atuais Estados. Morreu aos 32 anos, em 1920, após alguns anos de feliz vida conjugal, antes que pudesse examinar as experiências — não as últimas — da Liga das Nações e das Nações Unidas. neste campo. O mal que trazia, era em parte, fruto da pobreza da infância. Além disso, durante anos, afligia-o as disputas e ciúmes contra a U.E.A.. Agora ela se torna a própria estrutura do movimento e nossa grata lembrança voa ao rapaz firme e corajoso que a imaginou e criou. As suas idéias e à sua perseverança devemos em grande parte a vida da nossa língua.

(2) Originaloj de D-ro Zamenhof

Henerik Kocher

N-roj 5 kaj 6

Letero presita en Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu Junio-Septembro 1908

Karaj Sinjoroj!

Kun plezuro mi legis Vian sciigon pri la okazinta unua ekzameno en la Bohema Unio Esperantista. Mi sendas al Vi mian gratulon kaj mi esperas, ke Viaj atestej donos al ni baldaŭ multe da perfektaj Esperantistoj.

Al ĉiuj bohemoj, kiuj demandas min pri atestej mi kompreneble rekomendos la ekzamenojn en Via Unio.

Via Zamenhof

9.IX.1908

Karaj Sinjoroj!

Kun plezuroj kaj sincera danko mi ricevis Vian bele eldonitan gvidlibron pri Praha. Bedaŭrinde mi nun estas terure superŝargita de laboroj kaj tial mi ne povas atente legi la libron; sed kelkaj prove legitaj lokoj donas al mi

plenan certecon, ke la libro estas tre bona kaj estos sendube tre utila.

Via Zamenhof

N-ro 7

Letero presita en Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu Aŭgusto-Novembro 1909

Barcelona. 7/9/1909

Karaj Sinjoroj!

Mi ricevis Vian invitan leteron kaj ankaŭ la kongresan karton N-o 1. Plej koran dankon!

Malgraŭ mia sincera deziro mi bedaŭrinde ne povos veni al la Bohema Kongreso Esperantista; sed la titolon de honora prezidanto de Via kongreso mi akceptas kun plezuro kaj mi kore Vin dankas por Via honoro, kiun Vi faras al mi.

Mi deziras al la kongreso plej bonan sukceson. Al ĉiuj kongresanoj volu transdoni mian koran saluton.

Ĝuste en la tagoj de Via kongreso mi estos en vojaĝo kaj mi ne povos sendi al Vi salutan telegramon. Tial volu pardoni min kaj permesu, ke mia nuna letero anstataŭu la telegramon.

Kun sinceraj plej bonaj deziroj

Via Zamenhof

Traduka Konkurso

Brazila Esperantisto denove malfermas al la brazila esperantistaro konkurson konsistantan el traduko Esperanten de du literaturaj pecoj, proza kaj versa.

La kandidatoj povos traduki ambaŭ tradukpecojn aŭ simple elekti unu el ili. La tradukoj de la pecoj malsupre transkribitaj estu maŝinskribitaj nur sur unu flanko de ĉiu paperfolio kaj estos ricevataj ĝis la 31-a de Decembro de la kuranta jaro. Ili nur havu pseŭdonimon de la tradukinto ripetitan sur fermita koverto, enhavanta la nomon kaj adreson de la aŭtoro.

La plej bona traduko de la proza teksto kaj tiu de la versa estos publikigitaj en *Brazila Esperantisto*, kaj la aŭtoroj de la tri pli bonaj tradukoj ricevos premie Esperantan literaturan verkon.

La juĝantaro konsistos el tri membroj de *Brazila Esperanto-Ligo*.

La proza peco estas verkita de José Joaquim de Campos Medeiros e Albuquerque naskiĝinta en Recife de 1867 kaj mortinta en Rio de Janeiro en 1934. Li estis deputito, ĵurnalisto, direktoro de publika instruado, verkisto kaj iama prezidanto de *Brazila Klubo "Esperanto"*.

La versa peco estas soneto de Olavo Brás Martins dos Guimarães Bilac naskita en Rio de Janeiro, kie li mortis antaŭ sesdek jaroj, en 1918. Li estis alnomita "princo de la brazilaj poetoj", kaj fariĝis entuziasma simpatianto de *Esperanto*.

Medeiros e Albuquerque kaj Olavo Bilac estis membroj de la *Brazila Meletristika Akademio*.

Jen la tradukotaĵoj:

OS CRONISTAS

Medeiros e Albuquerque

Há quem afete desdenhar dos cronistas. São, segundo uma frase francesa, *diseurs de rien*.

Há, porém, nessa frase um engano profundo. Os que isso afirmam iludem-se com o tom de certos escritos.

O bom cronista revolve às vèzes idéias elevadíssimas, de várias categorais. O que há apenas é que não toma a atitude solene e emperdigada dos que, para dizer as mais triviais banalidades, usam expressões doutorais; parecem estar revelando aos povos embasbacados verdades novas,

não sabidas. O cronista que o sabe ser faz justamente o contrário.

Um atleta autêntico, de poderosos biceps, se encontra no seu caminho um pêso formidável, toma-lo-á naturalmente, como se estivesse levantando um leve objeto, e pô-lo-á de parte, num gesto simples e elegante. Um falso atleta preferirá exhibir-se no palco mostrando a massa que vai suspender, chamando a atenção para a façanha que haverá em elevá-la. Depois, curvando-se, simulará um esforço hercúleo, o rosto contraído, os músculos estufados. Tudo isso não passaria de uma fraude, e, sob a aparência de um pêso enorme, nada mais houvera, de fato, senão esferas ocas de madeira, pintadas como se fôsem de ferro.

DUALISMO

Olavo Bilac

Não és bom, nem és mau; és triste e humano...
Vives ansiando, em maldições e preces,
Como se, a arder, no coração tivesses
O tumulto e o clamor de um largo oceano.

Pobre, no bem como no mal padeces
E, rolando num vórtice vesano,
Oscilas, entre a crechça e o desengano,
Entre esperanças e desinteresses.

Capaz de horrores e de ações sublimes,
Não ficas das virtudes satisfeito,
Nem te arrependes, infeliz, dos crimes:

E, no perpétuo ideal que te devora,
Residem juntamente no teu peito
Um demônio que ruge e um deus que chora.

Oficiala Kumonikaĵo de la Akademio

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) "solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof" kaj de la unuanima Komitato de UEA "kiel eble plej baldaŭ" difini tiun solvon;

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. *Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en*

1970 = do la garantiantoj estos kvitaj:

- a) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekons-truadon;
 - b) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.
2. *Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo =*
- a) la ŝuldanto sensŭldigos la 9-an de Majo;
 - b) la ŝuldanto sensŭldigos plej malfrue la 8-an de Majo.
3. *Ni asertas, ke la aŭtomobilo de S-ro X estis efektive riparata la lastan samajnon =*
- a) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;
 - b) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.
4. *Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio =*
- a) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;
 - b) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉisuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967.

G. Waringhien, *Prezidanto*; P. Neergaard, kaj A. D. Atanasov, *Vicprezidantoj*; R. Bernard, *Sekretario*; D. B. Gregor, *Direktoro de la Gramatika Sekcio*.

Kanto de Drinkulo

Kabe

*Se oni diras: "prenu ĝin,
Pagita estas la kolekt'
Jen bona vin', ĉeval', knabin',
Donita ĉio por elekt'";
Petolas vane la ĉeval',*

*Allogas vane belulin',
Se staras ie la pokal',
Do vivu, vivu vin'!*

*En kelo sola sidas mi,
Ridetas al mi la barel',
La ĝojo regnas tie ĉi
Feliĉo, ĝuo en la kel'.
Forgesas mi, ke ruĝa naz',
Ke dika ventr' minacas min
Mi trinkas en ĉiu okaz',
Mi kantas: "vivu vin'!"*

*Al juĝ' mi venas post la mort'
Piedojn Diajn kisas mi:
"Favora estis mia sort'
— Malkaŝe diros mi al Li —
For, for, la paradizo for!
Diabloj ĉiuj prenu ĝin.
Vi metu min, ho Dia kor',
En regnon de la vin'!"*

(el Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia, 1904)

Aperfeiçõe a seu Conhecimento

U M A D E F I N I Ç Ã O

Viver é esquecer o mal que a tōda hora se recebe; é estender, hoje, ao inimigo rancoroso, a mão protetora que, ontem, ěle mordeu, feriu e sangrou; é abrir o coração aos sofrimentos alheios; é vasar na alma do próximo, a inunda-la, o oceano de amor e de esperança, em que se afogam as dores e as desditas dos homens; é combater o ěrro, estigmatizar a mentira, desfazer a calúnia, afrontar a insidia, sem humilhar o autor, confundindo-o sempre com a verdade e conquistando-o de preferēncia pelo perdão. Viver é ter ambições; é querer e poder; é aspirar e cumprir; é

desejar e atingir; é lutar e cair. Viver é ser homem; ser homem é ser forte; ser forte é ser justo. *Vita non est vivere sed valere.*

Alcebiades Delamare

(A traduaĉo deŝte treĉo virá no próximo número).

Recenzo

H. C. Andersen — *La Novaj Vestoj de la Imperiestro kaj du aliaj fabeloj.* — Trad. de Ib Schleicher. 1 vol. bele bindita. 52 p. 21 X 27 cm. Eldonejo KOKO — Kolbi Kaas — Danlando — 1964.

“La Novaj Vestoj de la Imperiestro” jam estas tre konata de la esperantistoj kun la titolo “La Novaj Vestoj de la Reĝo”. La du aliaj fabeloj estas “Hans-fuŝulo” kaj “Estas tute certe”, ankaŭ jam konataj en Esperanto.

La libro estas tre bele ilustrita de Gustav Hjortlund per tutpaĝaj multkoloraj bildoj.

“La Novaj Vestoj de la Imperiestro” admonas nin kontraŭ la blinda akceptemo de la publika opinio.

“Hans-Fuŝulo” montras, ke bagatelajoj povas iam esti pli konvinkigaj ol vera scienco; ĉio dependas de la juĝanto.

“Estas tute certe!” avertas nin kontraŭ la trograndigemo de la raportistoj.

Tiuj belaj rakontoj estis jam tradukitaj en Esperanton, sed el la germana lingvo; tial oni nun tradukis ilin el la dana originalo. La traduko estas tre bona kaj la libro estas plej interesa por ĉiuj aĝoj.

JUGU MEM! faktoj pri Ĉeĥoslovakio — dua eldono. — Broŝ. 114 p. 12 X 16 cm. — Eldono de la ŝtata Eldonejo ORBIS — Praha (Praga) — Ĉeĥoslovakio. — 1961.

Laŭ ĉi tiu libro la progresado de Ĉeĥoslovakio dum la lastaj dudek jaroj estas pli granda ol dum la antaŭaj mil jaroj.

La libro estas riĉe ilustrita kaj tre interesa. Ĝi detale informas nin pri la geografio, la historio, la ekonomio, la

edukado, socia organizado, labororganizado, trafiko, sportoj, bonstato de la civitano k.a.

La politika reĝimo estas socialismo. Laŭ la Pakto de Varsovio, la defendono de la lando, se necese, faros ĉefe Sovetunio kaj aliaj regnoj de la socialisma tendaro, tial la Respubliko preskaŭ ne havas elspezojn por sia propra defendo. Ĉe tio permesas al ĝi uzi ĉiujn rimedojn por paca progresado.

Preskaŭ ĉion, kion mi deziris scii pri tiu lando mi trovis en la libro. Mia sciivolemo estis nur pri la Justico. Ĉu en la punkodo ekzistas mortpuno? Ĉu estas aliaj gravaj punoj kontraŭ politikaj ideoj? Pri tio mi nenion trovis en la bonega libro.

Esperanto-The world Interlinguage. New revised Edition. — De George Alan Connor, Doris Tappan Connor, William Solzbacher, The Very Rev. Dr. J. B. Se-Tsing-Kao. Eldono de Thomas Yoselof — New York, London. — 1 vol. bele tole bind. 245 p. 12 X 17 cm.

Ĝi estas ses libroj en unu bindaĵo, ĉar ĉiu parto estas plena libro:

1. — Historio pri la lingvoj kaj la interlingvo, en angla lingvo.
2. — Plena lernolibro de Esperanto por anglalingvanoj. Tre praktika kaj lerte verkita.
3. — Legolibro de Esperanto en prozo kaj verso.
4. — Gvidlibro por praktika esperantisto en angla lingvo kun detala informaro pri la utileco de Esperanto en nia tempo.
5. — Esperanto-Angla vortaro.
6. — Angla-Esperanta vortaro.

Ĉi tiu bonega libro montras al anglalingvanoj, ke Esperanto ne estas ia projekto, sed lingvo internacia en plena uzado kaj jam nun tre utila por ĉiuj. La eminentaj Aŭtoroj estas du usonanoj, unu germano kaj unu ĉino. Ĉiuj, tre kleraj. Kiu scias la anglan lingvon nepre akiru ĉi tiun libron.

I. G. B.

M. J. Lermontov — *Kaŭkazaj Rakontoj.* — 1 vol. 70 p. 15 X 21 cm. El la rusa tradukis D. Staritsky —

Eldono de U.E.A. — Rotterdam
— 1964.

Lermontov estas mondfama rusa poeta naskita en 1814 kaj mortigita en duelo en 1841, kiam li estis nur 26-jara. Dum lia mallonga vivo li verkis nemortemajn poemojn kaj rakontojn; li estis dufoje ekzilita pro agado politika. Nur li kaj Puŝkin verkis en rusa lingvo mondfamajn poemojn. Ankaŭ en prozo li bele verkis kaj la tri rakontoj en ĉi tiu volumo montras lian modelan prozon, sed kiel prozverkistoj aliaj rusoj estas pli famaj ol li.

Libreto tre interesa kaj plej leginda.

I. G. B.

Brazila Kroniko

Pará

Belém — Sub aŭspicio de la Beletristika Centro de la Federacia Universitato de Pará, funkcias en la urbo Belém Esperanta kurso en tri niveloj, direktata de profesoro José Ribamar Leite de Azevedo. Por la jaro 1967-a enmatrikuligis 45 gelernantoj. Adreso: Rua Arcipreste Manuel Teodoro, 594 — Belém, Pará.

El tiu sama ĉefurbo venas sciigo pri elementa kurso, okazanta en la sidejo de Klubo Esperantista Zamenhof, sabate je la 4-a posttagmeze. La instruisto estas Jorge Urubatan Salgado.

Rio Grande do Norte

Natal — La konata literatura revuo "A Jurity" publikigis artikolon omaĝe al nia samideano prof. Arlindo Castor de Lima, prezidanto de la loka esperantista asocio kaj unu el la kunlaborantoj de la revuo.

Paraíba

Campina Grande — Plia kerno de disvastigo de la Internacia Lingvo estas starigita en la brazila nordorienta internlando: fondiĝis "Associação Campinense de Esperanto", kies prezidanto estas S-ro José Martins da Silva, komercisto en la urbo.

Pernambuco

Recife — La spiritisma bulteno *A Caminho da Luz* (Survoje al la Lumo) dediĉas kelke da artikoloj al Esperanto: historio, poezio kaj anoncoj pri la kursoj nuntempe funkciantaj en la urbo Recife. Al S-ro Arnon Vasconcelos, kiu gvidas tiun Esperantan sektion, ni sendas koran gratulon.

Bahia

Salvador — Rekomenciĝis kursoj de Esperanto en Lernejo Mariana Vianna, kun ĉirkaŭ 50 gelernantoj. Tie instruas S-roj Onias Almeida kaj Wilson Nascimento, konataj esperantistoj el Bahia.

Minas Gerais

Uberlândia — Ek de Februaro 1964 estas regule dissendata Esperanta programo — *O Esperanto em Marcha*, per Rádio Cultura de Uberlândia, ĉiusabate je la 7-a vespere.

Instituto Mackenzie, lernejo gvidata de Prof. Laszlo Zinner, universitata profesoro kaj entuziasma esperantisto, funkciigis trimonatan kurson, kiu finiĝis en Junio lasta kaj poste periode ripetiĝos.

Rio de Janeiro

Nilópolis — La loka *Rotary Club* entreprenis kampanjon por akceli la diskonigon de la Internacia Lingvo inter la rotarianoj. Kun tiu celo ĝi dissendis cirkuleron al la membraro kaj aperigis artikolojn pri Esperanto en la Julia numero de la kluba bulteno. Por tiu efika laboro ni ŝuldas apartan dankon al niaj samideanoj F. Miguens kaj Derosse de Castro Coutinho.

Niterói — La 20-an de Septembro 1967 festis sian 20-an datrevenon *Niterói Esperanto-Klubo*, unu el la plej gravaj organizaĵoj de nia movado. Al ĉiuj membroj de la klubo *Brazila Esperantisto* sendas koran gratulon.

Rezende — Per ĉarma arta vespero la esperantistoj de Rezende memorigis la naŭan jaron de funkciado de sia Esperanto-klubo. Kvankam tre nova, la movado en Rezende rimarkinde progresas: la instruado de la lingvo estas komisiita al kapitano Rocha Marino, kiu gvidas kurson en la sidejo de la klubo.

São Paulo

Ribeirão Preto — Nova estraro de Ribeirão Preto Esperanto-Klubo estas elektita por la jaro 1968-a: prez.: Osvaldo Arruda Stein; 1-a sekr.: Valdir Pires; 2-a sekr.: Manoel Siscatti; Gen. Sekr.: José Pedro Miranda; Kasisto: Domingos Barrilari; Bibli.: Miram de Souza Strambi. La klubo kompletigis sian unuan jaron en Decembro 67; en la memoriga festo, S-ro José Pedro Miranda oficiale enoficiĝis kiel delegito de U.E.A., kaj oni disdonis diplomojn al la lernantoj de elementa kurso de Esperanto.

São Paulo — La esperantistoj radioamaratoj de ŝtato São Paulo fondis klubon, bonvolu sin turni al S-ro Luis Bolívar Fosca (radio-amatoro PY-2BF). La adreso de la klubo estas: Avenuo Jaquara, 1311-2.º, São Paulo.

Goiás

Goiânia — En la sidejo de la urba Industria Federacio okazis Esperanta ekspozicio de libroj kaj revuoj, memorige al la dato de publikigo de la unua Esperanta libro, en la 14-a de Julio. Organizis la ekspozicion estraranoj de Goiânia Esperanto-Klubo.

Radioprogramoj

Radiovox (mezaj ondoj: 1.580 kc.) el Muritiba, Bahia, elsendas dimanĉe de la 8,30 ĝis 9-a informon, kurson, muzikon, deklamadon.

La respondeca redaktoro estas S-ro Manoel Borges dos Santos. Kunlaborantoj: S-roj Evandro Mota kaj Alael Kardec.

Rádio Ministério da Educação e Cultura (ondoj: 16.78 m, 17.875 kc.; 25.10 m, 11.950 kc; 30.71 m, 9.770 kc.) el Rio de Janeiro daŭre transsendas novaĵojn pri Esperanto, merkrede kaj sabate, en la kadro de la programo "Música e Notícias" (Muziko kaj Novaĵoj) prezentita de lundo ĝis sabato de la 9-a ĝis la 10-a matene.

En la programo oni plezure disaŭdigas informojn kaj novaĵojn, tamen estas notinde, ke pro la karaktero de la programo — cele al neesperantista publiko — la materialo por dissendado nepre atingu la ĝeneralan sciivolon.

Oni sendu la novaĵojn kaj informojn al la faka redaktoro, S-ro Joel Manso, Rádio Ministério da Educação e Cultura, Praça da República, 141-A; R.J.; GB.

Anoncetoj

* Biblia Koresponda Kurso *La Navigantoj* kaj diversaj aliaj evangeliaj eldonaĵoj estas senkoste haveblaj ce Esperanto-Misio, Sveda sekcio de K.E.L.I., Box 7, S-690 51 Ostansjö, Svedujo.

* S-ro Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo aĉetos jenajn elĉerpitajn numerojn de *Brazila Esperantisto*: 4 kaj 5 de 1907; 1 de 1908; Okt. 1933-Feb. 1934; Mar.-Dec. 1934.

* Dez. kor. F-ino Vanjuša Lukanova, Vasil Levski 43, Mihajlovgrad, Bulgarujo.

* F-ino Sigeyo Nomura, Nisigaoka 2-10-1, Kita, Tokio, Japanujo.

Nekrologo

João Guimarães Rosa

Nia eminenta samideano Ambasadoro João Guimarães Rosa, konata verkisto kaj membro de la Brazila Literatura Akademio mortis en la 19-a de Novembro 1967, en Rio de Janeiro.

Poligloto, li regis ankaŭ Esperanton, kiun li lernis ankoraŭ juna en Belo Horizonte.

Kiel Delegito de la Brazila Registaro li reprezentis nian landon en la XXXV Universala Kongreso de Esperanto en Parizo.

José Carlos de Macedo Soares

Mortis en São Paulo, la 19-an de Januaro lasta nia eminenta bonfarinto Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares. Kiel prezidanto de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj helpate de nia karmemora amiko Mario Augusto Teixeira de Freitas, li multe kontribuis por nia Movado, precipe per la aperigo de pli ol dudek eldonaĵoj. Dank' al lia prestiĝo estis preparita la grava petskribo prezentita al la Organizaĵo de la Amerikaj Ŝtatoj de la prezidantoj de plej eminentaj brazilaj institucioj.

Brile kaj efike li prezidis en 1945 la Organizan Komitaton de la 10-a Bra-

zila Kongreso de Esperanto kaj sekve pro speciala omaĝo de la esperantistoj la Kongreson mem.

Li estis Federacia Deputito, Ministro de Justeco kaj Enlantaĵ Aferoj, Ministro de Eksterlandaj Aferoj. (du fojojn) Regdelegito en ŝtato São Paulo, Dumviva Prezidanto de la Historia kaj Geografia Instituto de Brazilo kaj Prezidanto de la Brazila Societo de Geografio.

Hans Jakob

En Oktobro de la pasinta jaro mortis Hans Jakob, kompetenta kaj sindona esperantisto de nia movado kaj iama ĝenerala sekretario de U.E.A.

Li naskiĝis en la 15-a de Decembro 1891 en Heidelberg kaj fariĝis delegito de sia naskiĝurbo en 1909; de 1912 oficisto de U.E.A. en Genevo; de 1920 ĝis 1924 ĝenerala sekretario; de 1924 ĝis 1934 Direktoro de la Centra Oficejo; de 1947 ĝis 1955 redaktoro de la revuo "Esperanto"; 1947-1961 komitatano, estraro kaj administranto de la Serva Centro. Ekde 1913 li prizorgis la bibliotekon de Hector Hodler (poste de U.E.A.). Li redaktis la Jarlibron de 1921 ĝis 1940. Verkinto de multaj artikoloj en Esperanto sub pseŭdonimo Agricola, kiuj atestas fundan konon de nia movado.

(En ĉi tiu momento ni honorigas Hans Jakob memorigante influon, kiun li havis sur nian landan Movadon. Li estis Ĝenerala Direktoro de U.E.A. en 1929, kiam la asocio ankoraŭ ne estis la centro de la tutmonda Movado. D-ro Carlos Domingues, tiam prezidanto de Brazila Klubo "Esperanto", vizitis Genevon, kaj Jakob sugestiis al li, ke la anoj de la klubo kaj de la nacia ligo fariĝu membroj de U.E.A. La sugestio estis akceptita, kaj sekve de tio la membraro de tiuj du brazilaj institucioj estis pli konstanta kaj efektiva pro la ideo, ke Esperanto ne povas ne esti tutmonda afero. La ekzemplo estis imitita de aliaj grupoj.)

Kelkajn jarojn poste pro reformo de nia Movado la aliĝo al U.E.A. fariĝis deviga por ĉiuj membroj de landaj asocioj. Sed tio jam validas en Brazilo ekde sufiĉe longa tempo.)

53-a Universala Kongreso

La turisma agentejo "Agência Globo de Passagens" komunikis al ni, ke ĝi havas specialan vojaĝplanon por la espe-

rantistoj, kiuj deziras iri al la Kongreso en Madrid. Adreso: Rua D. José de Barros, 239 — 3.º andar, São Paulo SP.

Esperanto no estrangeiro

Bélgica — A revista internacional de anúncios *Van Welsenis' Friends*, remetida a correspondentes, coleccionadores, etc., além do inglês, francês e holandês, está utilizando também o esperanto nos seus comunicados. Informações: Srta. Leibovitch Gloria, 55 Consciencestraat, Antuérpia I, Bélgica.

Espanha — O Secretário Geral do Ensino Primário, Sr. Joaquim Tena Artigas, confirmou promessa anteriormente feita ao Hispana Esperanto-Instituto de enviar representante oficial à XI Reunião Infantil do LIII Congresso Universal de Esperanto a realizar-se em Madrid de 3 a 10 de agosto próximo.

Itália — Em Roma, na reunião anual do Conselho Nacional da Interpol (Organização de Polícia Internacional), o presidente, Capitão Antonio Micale, propôs que os membros da organização italiana aprendessem Esperanto, para facilitar os contactos entre os colegas de outros países. O Cel. Francisco Andreotti, membro da comissão executiva internacional propôs que também se discutisse o assunto no próximo Congresso Mundial da Interpol, a realizar-se em Amsterdã.

Nações Unidas — *Angaroj*, o primeiro filme de aventuras falado em Esperanto, foi exibido no ano passado na sede da ONU. Em decorrência dessa apresentação, iniciou-se um curso de Esperanto (método Csech) para funcionários daquela organização internacional.

Polônia — A IV Féria Internacional Esperantista será em Miedzygórze de 17 a 30 de setembro do corrente ano. Maiores informações na Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, Wrocław 17, Caixa Postal 8, Rua Dubois 3, Polónia.

Quo Vadis? Romance do tempo de Nero. H. Sienkiewicz. Admirável tradução de Lidia Zamenhof. NCr\$ 11,20.

Elektitaj Poemoj de Castro Alves. Trad. de L. H. Knoedt. Opinião favorável da crítica mundial. NCr\$ 3,00

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

Fondita en la 19-a de Junio 1906

Sidejo: Praça da República, 54, Rio de Janeiro, GB. Malfermita en la labortagoj de la 8-a ĝis la 18-a. Kunvenoj: sabate de la 14-a ĝis la 18-a

Laŭ la rubrikoj *Diplomoj* kaj *Laŭgrupa Membro-Statistiko* de la antaŭa numero de *Brazila Esperantisto*, oni povas formi ideon pri la aktivecoj de B.K.E. en 1967. La lecionoj kaj la tradicia sabata kunveno okazis akurate. Oni menciuj, ke dum la kunvenoj estis traktataj nur Esperantaj temoj aŭ ĝeneralaj temoj en Esperanto. Ĉiuj membroj, inkluzive de la lernantoj, estis enskribitaj en B.E.L.-U.E.A. kaj plene informitaj pri la Movado.

— En 1967 nia membro S-ro Francisco Ferreira de Souza gvidis elementan kurson de Esperanto ĉe Grupo da Fraternidade Irmã Scheilla en la najbara urbo Nova Iguaçu, sabate de la 15-a ĝis la 16-a.

— Unu el la plej ŝatataj sabataj programoj estis la legado de la teatraĵoj de la verko "Teatro de Machado de Assis".

— La 19-an de Majo de la pasinta jaro, S-ro Luiz Alberto Martins prelegis pri deklamado. Li mem deklamis poeziaĵojn de Zamenhof kaj prezentis an-

kaŭ gramofondiskon de la fama portugala deklamisto João Vilaret.

— La 16-an de Septembro okazis memoriga festo pri la centa datreveno de Medeiros de Albuquerque. La ĝenerala sekretario parolis pri la agado de tiu eminenta verkisto, politikisto kaj ĵurnalistoj rilate al Esperanto, reliefigante la fakton, ke li prezidis nian klubon en 1907 kaj jam en 1898 verkis artikolon en *Revista Brasileira* favore al Esperanto.

— En la 23-a de Septembro vizitis nin la gefratoj D-ro Jaime Scolnik kaj D-ino Rosa Scolnik, argentinaj samideanoj, kiuj dum la kunveno priskribis sian vojaĝon al Afriko.

— S-ro Gert Drucker, prezidanto de Paraná Espeanto-Asocio, partoprenis nian kunvenon de la 28-a de Oktobro, parolante pri la Esperanto-movado en sia Stato.

— S-ro Waldyr Duarte de Souza ricevis en la 2-a de Decembro la libron "Elektitaj Poemoj" de Castro Alves, kiel premion tial, ke li venkis konkurson laŭ kiu oni diveni deklami poeziaĵojn de Zamenhof enhavatan vorton hazarde prezentitan al la kandidatoj.

Que faz a U. E. A.?

- A U.E.A. promoveu gigantesca campanha junto às Nações Unidas para introdução do Esperanto nas escolas. Como consequência disso, a Unesco aprovou, em 1945, importante resolução favorável ao Esperanto. Em 1966, a U.E.A. apresentou à O.N.U., em Nova Iorque, nova proposta com um número ainda maior de petiçãoários.
- O Centro de Pesquisa e Documentação da U.E.A. remete regularmente à Unesco, à importantes organizações internacionais e a diversos países informações classificadas sobre a divulgação do Esperanto.
- Os Congressos Universais e a Universidade Internacional de Verão, organizados pela U.E.A., demonstram com imponência o papel prático e cultural da Língua Internacional.
- A U.E.A. edita o Anuário (em duas partes), com mais de 600 páginas, em que se encontram endereços de mais de 2.500 delegados, informações sobre a U.E.A., sobre Associações Nacionais, Associações Especializadas,

Academia de Esperanto, congressos, periódicos, edição de livros, etc.

- A U.E.A. publica mensalmente a revista *Esperanto*, com artigos sobre cultura, literatura, notícias do movimento esperantista, notas literárias, ilustrações, etc.
- A U.E.A. mantém serviços sobre filmes, fotografias, diapositivos, fitas magnéticas, correspondência, etc.
- a U.E.A. expede anualmente inúmeros exemplares de alguns milhares de obras diversas sobre as quais informa o Anuário.
- A U.E.A. publicou até agora quatorze vocabulários técnicos (na segunda parte do Anuário).
- A U.E.A. edita a revista *La Praktiko*.
- A U.E.A. possibilitou a representação de Montevideu e Nova Iorque.
- A U.E.A. promove os Concursos de Belas Artes e a Exposição Universal.
- A U.E.A. dirige o Serviço Internacional de Imprensa e o Departamento Editorial.

Anúncio

Coleção Internacia Mondliteraturo.
Jóias da literatura mundial. Preço de cada volume: NCr\$ 1,40.

Hermano kaj Doroteo. Goethe (Küster).
Legendoj. Niemojewski (Kuhl).
Elektitaj Noveloj. Turgenev (Mexin).
La Nigra Galero. Raabe (Wicke).
El la "Camera Obscura". Hildebrand (Mees).
El la Skizlibro. Irving (Elvin).
Petro Snhlemihl. Chamisso (Wüster).
Nuntempaj Rakontoj. Stamatov (Krestanoff).
Tri Noveloj. Puŝkin (Fiŝer).
Ses Noveloj. Poe (Milward).
La Firmao de la Kato, Kiu Pilkludas Balzac (Benoit).
Orientaj Fabeloj. Doroŝeviĉ (Hohlov).
Noveloj. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof).
Insulo de Feilĉuloj. Strindberg (Frode).
Barbaraj Prozaĵoj. Bertrana (Casas).
Ano de l'Ringludo. Ŝimunoviĉ (Janjiĉ).
Servokapabla. Marcus Tybout. Eekhoud (Bergiers).
Nobela Peko. Sadoveanu (Morariu).

Preço duplo:

Deklaracio. Ariŝima (Tooguu)

Coleção Muusses Esperanto-Biblioteko
Coletânea de obras famosas. Cada volume: NCr\$ 1,05.

Rusaj Noveloj. Lermontov e Mamin-Sibirjak (Filatov).
Tra Usono Kun Ruliĝanta Hejmo. Scherer.
La Avo. Petöfi (Spieler).
La Jusenaskito. Bengoa (Berenguer).
Jubilea Kongreso en Krakovo (1912).
Paroladoj de la Ora Jubilea Kongreso. (Glück).
Nordnordaj Fabeloj. Thézard.
En la vagono kaj aliaj rakontoj. Ŝirjaev.
Rozinjo. Török (Kalocsay).
El la Londona skizlibro. Dickens (Whatham).
Flugado Alimonden. Dodge.
Patro kaj Filo. Jovkov (Iskrov).

MOZAIKO

Anekdoto



Kuirarto

Spinacokremaĵo. Ingrediencoj: 1 granda fasko da spinaco; 1 glaso da lakto; 1 supkulero de butero; 1 ovo; 2 supkulereroj da maizfaruno; 1 supkulero da raspita Parma fromaĝo; salo.

Preparmaniero: kuiru la spinacon en akvo kun salo. Elfluigu la akvon. Miksu la spinacon kun la aliaj ingrediencoj en elektra kirlilo. Kuiru la miksaĵon ĉiam kirlante ĝis ĝia densiĝo.

Kuriozaĵoj

— La brazila pino estas malsimila al la eŭropa pino. Ĉi tiu lasta estas konusa, nomita inter ni "Kristnaska arbo", dum la brazila pino aspektas granda kaliko aŭ umbrelo. La brazila pino (*araucaria angustifolia*) apartenas al la koniferoj, nomo de la vegetaĵoj produktantaj fruktojn konusformajn.

— Blumenau, grava urbo de Ŝtato Santa Catarina, estas fondita de la germana saĝulo D-ro Hermann Otto Blumenau, en la 2-a de Septembro 1850.

— Brazilo estas la plej granda produktanto de kakao en Ameriko kaj la tria en la mondo.